

*F. Vilain
Kerkrade.*

IMITADO

DE

JESU-KRISTO

12285

12285

LEBU-KRISTO
MAYADO

BIBLIOTEKO
Hector Hodler



IMITADO
DE
JESU-KRISTO

TRADUKIS
PAUL DESCHAMPS




UNUA LIBRO



PRESEJO S. MARTINO
SAINTE-RADEGONDE (I.-&-L.)

—
1909

V75/D5.29-Esp-



U

=

U

P

en

Kr

ni

du



IMITADO
DE
JESU·KRISTO

UNUA LIBRO

Utilaj konsiloj pri la vivo spirita

UNUA 'CAPITRO

*Pri l' imitado de Kristo kaj malŝato
de ĉiuj vanajoj mondaj.*

1. « Kiu sekvas min ne marŝas en mallumo. » Jen estas paroloj de Kristo, per kiuj Li admonas nin, ke ni imitu Lian vivon kaj Lian konduton, se ni volas esti vere lumig-

ataj kaj de ĉiu blindeco je l' koro liberigataj.

Nia do precipega zorgo estu mediti pri la vivo de Jesu-Kristo.

2. La Krista doktrino superas ĉiujn doktrinojn de sanktuloj; kiu spiriton ĝian posedus, tiu manaon tie kaŝitan eltrovus. Sed okazas ke multaj homoj oftege l' Evangelion aŭdantaj, nur malmulte kortuŝiĝas, tial ke Kristan spiriton ili ne havas. Kiu volas la parolojn de Kristo plene kaj ĝuste kompreni, tiu devas konformigi sian tutan vivon al Lia.

3. Kiele utilos al vi profunde diskutadi pri Triunuo, se vi malposedos humilecon, kaj per tio malplaĉos mem al la Triunuo?

Belegaj paroladoj jane faras homon sankta kaj justa; sed pura vivo igas lin kara al Dio.

Mi pli amas senti penton ol koniĝian difinon.

Se vi memore sciustutan Biblion, kaj samtempe sentencojn de ĉiuj filozofoj, por kio utilis al vi ĉio tio sen amo al Dio kaj helpo de Li?

4. Vaneco de vanecoj, kaj ĉio vaneco, escepte ami Dion kaj Lin solan servi!

Superega saĝeco estas celi la ĉielan gloron per malestimo *de l' mondo*.

Vantaĵo estas do kolekti pereeman riĉecon kaj en ĝi esperi.

Vantaĵo ankaŭ, ambicii honorojn kaj sin altigi al estimegata stato.

Vantaĵo, karnajn plezurojn sekvi kaj avidi tion pri kio baldaŭ venos severega puno.

Vantaĵo, longan vivon deziri, kaj malforte zorgi pri bona vivo.

Vantaĵo, nunan vivon nur atenti, kaj la aferojn estontajn ne antaŭvidi.

Vantaĵo, tion amegi, kio rapidege pasas, kaj ne rapidi tien, kie restadas eterna feliĉeco.

5. Tiu proverbon ofte rememorigu: Okulo ne satigas pri vivado, orelo ne plenigas pri aŭdado.

Elprenu do zorge vian koron el amo al videblaj aferoj, kaj ĝin al la nevideblaj turnu; ĉar la homoj, kiuj serĉas sian sentamon, malpurigas sian konsciencan kaj perdas la gracon de Dio.



DUA 7CAPITRO

Humile pensu ni pri ni mem

1. 7Ciu homo nature deziras sciŭ ;
sed kion valoras scienco sen timo
al Dio ?

Pli bona estas certe humila kamp-
arano, kiu servas Dion, ol malhu-
mila filozofa kiu, ne zorgante pri si
mem, a tran kuradon konsideras.

Kiu bone sin konas, sin malestimas
kaj mĉatas la homajn laŭdojn.

Kiam universalan sciencan mi tute
posedus, en kio, se mi ne havus ka-
riton, tio ĉi utilis al mi antaŭ Dio,
kiu min juĝos laŭ la faroj.

2. Moderigu pri tro fervora deziro
al scienco, ĉar tie vi trovos nur
grandan distrecon kaj iluzion.

Scienculoj tre ŝatas ŝajni instruituloj kaj esti tiel nomataj.

Estas multaj objektoj, kiuj malmulte aŭ neniel utilas al la animo; kaj tiu estas malsaĝega, kiu sin okupas pri ceteraj aferoj, kiuj lian savigon ne interesas.

Multaj vortoj ne satigas animon, sed bona vivo koron trankviligas, kaj pura konscienco donas grandan konfidon al Dio.

3. Ju pli multe kaj bone vi scias, des pli severe vi estos juĝata, se vi ne estos pli sankte vivinta.

Ne volu do fierigi pro arto aŭ scienco ajn, sed prefere timu pro kono al vi donita.

Se vi kredas, ke vi scias multon kaj bone, memoru tamen ke plimulton vi nescias.

Vin ne plialtigu mem, sed plivole konfesu vian nesciencan.

Kial vi volas pli ami vin ol ceterajn, kiam ekzistas homoj pli kleraj ol vi kaj pli lertaj pri dia leĝo?

'Cu vi volas ion utile scii kaj lerni? Amu esti nekonata kaj ŝatata kvazaŭ nenio.

4. La plej alta kaj plej utila scienco konsistas el la plej ĝusta kono kune kun malestimo de si mem.

Pro nenio grandiĝi kaj pri aliaj homoj ĉiam favore kaj alte opinii estas granda saĝeco kaj perfekteco.

Se vi vidus fraton malkaŝe kaj eĉ gravege pekantan, ne kredu tamen ke vi estas pli bona ol li, ĉar vi ne scias kiom da tempo vi povos en bono persisti.

Ni ĉiuj estas kadukaj; sed kredu vin pli kaduka ol iu ajn.



TRIA 'CAPITRO

Pri la Scienco de Vero

Feliĉa tiu, kiun la Vero mem instruas, ne per figuroj kaj forkurantaj vortoj, sed de si mem, tia kia ĝi estas.

Racio nia kaj niaj sentoj malmulte vidas, kaj ofte nin trompas.

Por kio utilas lerta diskutado pri kaŝitaj kaj mallumaj aferoj, pri kiuj la juĝonta Dio ne riproĉos nian ne-sciencon.

Granda malsaĝeco estas, ne zorgi pri aferoj utilaj kaj necesaj, kaj al malutilaj kaj kondamnigaj scivole penadi. Ni havas okulojn kaj ne vidas.

2. Kial priokupas nin la demandoj pri gentoj kaj specoj?

De multaj opinioj liberigata estas tiu, al kiu la Vorto eterna parolas.

El tiu sola Vorto ĉio eliras, kaj el ĝi devenas ĉiu parolo; kaj ĝi estas Principo, kiu parolas en ni.

Sen ĝi neniu komprenas aŭ rekte juĝas.

Homo, al kiu unu afero estas ĉio, kaj kiuj ĉion rilatas al unu, kaj en unu vidas ĉion, tiu ne ŝanceliĝos, kaj lia koro restados ĉiam en Dio.

O Vero, kiu estas Dio, faru ke mi estu unu kun vi en eterna karito.

Ofte tedas min multon legi kaj aŭdi; en Vi estas ĉio, kion mi petas kaj deziras.

Silentigu ĉiuj doktoroj, kaj ĉiuj kreitaĵoj antaŭ Vi: al mi parolu Vi sola.

3. Ju pli homo estas enpensigema kaj liberigita el eksterajoj, des pli vastiĝas kaj altiĝas lia spirito sen

ia peno, tial ke de supre li ricevas lumon por kompreni.

Animo pura, simpla kaj firma en bono neniel estos distrata pro la multo de aferoj, ĉar tute trankvila ne zorganta pri si, ĝi plenumas ĉion por honori Dion, kaj sin liberigas de priokupado pri si mem.

Kio vin lacigas kaj turmentas pli ol la nemortifikata agemo de via koro?

Homo bona kaj vere pia unue disponas interne la aferojn, kiujn ekstere li devas fari. Neniaj aferoj altiras lin al deziro por malvirta inklino, kontraŭe li submetas ilin per regulo de rekta racio.

Kiu batalas pli forte ol tiu, kiu penadas por venki sin mem?

Nia precipa okupado devus esti: bataladi kontraŭ ni, ĉiutage fariĝi pli fortaj kontraŭ ni, iom ĉiutage progresadi al bono.

4. 'Ciu perfekteco, en tiu ĉi vivo, enmiksiĝas je kelka malperfekto; kaj ĉiuj niaj lumoj estas malheligitaj de ia mallumo.

Humila kono de ni mem estas vojo pli certa por iri al Dio, ol lerta serĉado de l' scienco.

Oni ne devas mallaŭdi sciencon, nek la konon de ia afero, ĉar tio en si estas bona, kaj de Dio ordigita; sed oni devas ĉiam preferi konsciencon puran kaj sanktan vivon.

Tamen tial ke multaj homoj pli klopodas por koni ol por bone vivi, ili ofte craras, kaj preskaŭ nenian aŭ malbonetan frukton ricevas el sia laborado.

5. Ho! se ili tiom da fervoro alportus por forigi siajn malvirtojn kaj por praktiki virton, kiom por diskutadi vanajn demandojn, ne aperus en popolo tiel multaj malbonoj kaj

skandaloj, nek tiel granda malkonduto en monaĥejoj!

Certe, en la juĝa tago, oni ne demandas nin pri niaj legadoj, sed pri niaj agoj; nek ĉu ni bone paroladis, sed ĉu ni bone vivis.

Diru al mi : Kie nun estas tiuj majstroj kaj doktoroj, kiujn vi konis vivantajn, kaj brilantajn en ilia scienco?

Ilin anstataŭas aliaj, kiuj eble pri ili eĉ ne pensas plu.

Dum ilia vivo ili ŝajnis io konsiderinda : kaj nun oni ne parolas plu pri ili.

6. He! Kiel rapide pasas la monda gloro ! Volu Dio, ke ilia vivo estu konsenta kun ilia scienco ! Ili tiam estus utile legintaj kaj lernintaj.

Kiom da homoj perdiĝas en la mondo per vana scienco kaj per forgeso de l' Dia savo !

Kaj tial ke ili pli ŝatas esti grandaj ol humilaj, ili perdas sin en siaj pensoj.

Tiu estas vere granda, kiu havas grandan kariton.

Tiu estas vere granda, kiu sin estimas malgranda kaj kiu ŝatas kiel nenion le plej altajn honorojn de l' mondo.

Tiu estas vere saĝa, kiu la terajn aferojn konsideras kiel koton por gajni Kriston.

Tiu posedas la veran sciencan, kiu obeas la Dian volon kaj forlasas la sian.



KVARA 'CAPITRO

Pri singardemo en agado

1. Oni ne devas kredi al ĉiu vorto, nek al ĉia instinkto; sed oni devas pesi ĉion laŭ Dio, prudente kaj atentege.

Ho ve! pri aliaj ni kredas kaj diras pli facile malbonon ol bonon; pro tio ni estas malfortaj. Sed perfektaj homoj nefacile fidas al ĉiaj rakontoj; ĉar ili konas la homan naturon, inklinan al malbono kaj malseriozan en paroloj.

Granda saĝeco estas ne agi tro rapide, nek en propra sento obstine stariĝi.

Saĝeco ankaŭ ne akcepti homan

parolon ajn, kaj la aŭditan kaj kreditan tuj al ceteraj homoj raportti.

Konsiliĝu kun saĝa kaj konseienea homo kaj celu instruiĝi de plibonulej plivole ol sekvi viajn proprajn pensojn.

Bona vivo faras homon saĝa laŭ Dio kaj multe lerta.

Ju pli humila oni estos kaj al Dio servema, des pli oni fariĝos saĝa kaj pacema en ĉiuj aferoj.



KVINA 'CAPITRO

Pri la legado de l' Sankta Skribo

1. Vero estas serĉota en la Sankta Skribo, kaj ne elokventeco.

La tuta Skribo estas legota kun tiu spirito, kiu ĝin inspiris.

En ĝi ni devas serĉi utilaĵon plivole ol delikatan lingvaĵon.

Ni devas ankaŭ legi simplajn kaj piajn librojn tiel volonte, kiel la profundajn kaj altegajn.

Ne estu influata pro le graveco de verkinto, ĉu li estas malmulte aŭ multe sciencia; sed legu nur pro amo al Dio.

Ne serĉadu tiun, kiu parolis; nur konsideru, kion oni diras al vi.

1. La homoj pasas, sed la Dia vero restadas eterne.

Dio parolas al ni diversmaniere, kaj ne atentante pri la personoj.

Nia sciemo nin ofte malhelpas, en la legado de l' Sankta Skribo, ĉar ni volas kompreni kaj diskutadi, kie oni nur devus preterpasi.

Se vi volas frukton elpreni, legu humile, simple kaj fidele; ne penadu ŝajni lertulo.

Demandu volonte, kaj aŭdu silente la parolojn de l' Sanktuloj; ne malŝatu la sentencojn de maljunuloj, tial ke ili ne elparolas vane.



SESA 'CAPITRO

Pri malordigitaj amemoj

1. Tuj kiam homo ion ekdeziras malordeme, li fariĝas en si maltrankvila.

Fierulo kaj avarulo neniam havas ripozon; malriĉulo kaj humilulo pacege vivadas.

Homo, kiu ne ankoraŭ estas en si mortifikata, rapide estas tentata, kaj venkata en malgrandaj kaj malgravaj aferoj.

Tiu, de kiu spirito estas ankoraŭ malforta, kaj kelkamaniere karna, kaj inklinata al sentebaj aferoj, multe penadas por fortiri sin el la teraj deziroj.

Li ja ofte sentas malĝojon, kiam li

sin fortiras ; kaj iom malpacienciĝas
se lin iu kontraŭbatalas.

2. Se li atingas, kion li deziras, tuj
li malĝojas pro konsciencia riproĉo
tial ke li sekvis sian pasion, kiu
neniel utilas al paco serĉita de li.

Oni trovas la pacon de l' koro, ne
cedante, sed kontraŭstarante al pa-
sioj.

Nenia paco estas do en la koro de
karna homo, nek en tiu dediĉita al
eksteraj aferoj, sed nur en fervora
kaj spirita homo.



SEPA 'CAPITRO

*Fierecon kaj vanajn esperojn
malamu*

1. Ne saĝa estas, kiu sian esperon metas en homoj aŭ en kreitaĵoj.

Ne hontu servi aliajn homojn pro la amo al Jesu-Kristo, kaj en tiu ĉi mondo ŝajni malriĉa.

Sur vi mem ne apogu, sed esperu en Dio sole.

Agu laŭ via kapableco kaj Dio helpos vian boninteneon.

Ne konfidu al via scienco, nek al la lerteco de iu ajn vivanto, sed prefere al la Dia favoro, kiu helpas humilulojn kaj humiligas la tromemfidulojn.

2. Riĉulo, pri viaj riĉaĵoj ne glor-

iĝu, nek pri viaj amikoj tial, ke ili multepovaj estas, sed en Dio kiu ĉion donas kaj sin mem preter ĉio deziras doni.

Ne plialtiĝu pro la beleco aŭ forteco de via korpo, kiun okaza malsano deĵetas kaj putrigas.

En vi mem ne kontentiĝu pro via spriteco aŭ lerteco, timante ke vi malplaĉu al Dio, el kiu venas ĉia bono, kiun vi nature ricevis.

3. Ne vin estimu pli bona ol ceteraj, por ke vi ne ŝajnu pli malbona antaŭ Dio, kiu konas tion, kio estas en homo.

Ne malhumiliĝu pro viaj bonaj agoj, ĉar Dio ne juĝas samamaniere kiel la homoj, kaj kio plaĉas al homoj, ofte tio al Li malplaĉas.

Se vi havas ion bonan, kredu, por konservi humilecon, ke io pli bona estas en aliaj.

Ne malutilos al vi malleviĝi mal-
supren de ĉiuj; sed malutilege estus
vin plialtigi super unu.

Nedifekteblan pacon ĝuas humil-
ulo; malhumilulo koleron kaj envion
oftege sentas.



OKA 'CAPITRO

Tro grandan intimecon evitu

1. Ne aperigu vian koron al ĉiuj indiferente, sed donu vian konfidon al homo saĝa kaj timanta Dion.

Malofte restadu inter junhomoj kaj mondumaj personoj.

Ne flatu la riĉulojn, kaj ne celu aperi antaŭ la granduloj.

Kuniĝu kun humiluloj, simpluloj, piaj kaj bonmoraj homoj; kaj nur interparolu pri edificaj aferoj.

Ne estu intimega kun kiu ajn virino; sed al Dio rekomendu ĉiujn virinojn virtemajn.

Intimecon deziru nur kun Dio kaj anĝeloj, kaj ne celu esti konata de homoj.

2. Oni devas ami ĉiujn homojn; sed intimegeco kun ĉiuj estas evitinda.

Okazas ke ia persono nekonata brilas pro sia famo, kaj, montrante sin, ĝi detruas opinion antaŭ-pensitan de ni.

N imagas kelkafoje plaĉi al ceteraj per nia intimeco, kaj ni tiam komencas malplaĉi al ili pro la difektoj, kiujn ili eltrovas en ni.



NAŬA 'CAPITRO

Pri obeo kaj submetiĝo

1. Tre grava estas vivi en obeado sub estro, kaj ne dependi nur de si mem.

Estas multe pli sendangere obei ol ordoni.

Multaj homoj obeas pli pro neceso ol pro amo; tiuj ĉiam suferas kaj facile murmuretas.

Iru kien vi volos, neniam vi trovos ripozon se ne per humila submetiĝo al estra regularo.

Multaj personoj, imagantaj ke ili estos pli sanktaj en aliaj lokoj, eraris pri tiu ŝanĝa revo.

2. Estas vere, ke ĉiu sian propran senton sekvas, kaj pli inkliniĝas al samideanoj.

Se tamen ni volas ke Dio estu inter ni, necese estas ke ni forlasu iafoje nian opinionon por havigi pacon.

Kiu homo estas tiel klera, ke ĉion tute scii li povas ?

Tial al opinio via ne tro fidu, sed aŭskultu volonte tiun ankaŭ de aliaj.

Se via opinio estas bona, kaj se vi pro Dio ĝin forlasas kaj sekvas alian, vi pli grandan profiton akiros.

3. Mi ofte aŭdis, ke pli senriska estas ricevi konsilon ol doni.

Okazeble via propra opinio estos bona; sed ne voli kun aliaj konsenti, kiam tion postulas okazo aŭ saĝo, estas signo de fiereco kaj obstineco.



DEKA 'CAPITRO

Senutilajn interparolojn evitu

1. Evitu kiel eble la tumulton de l' mondo; multe ja malutilas zorgado pri mondaj aferoj, eĉ kun intenco pura.

Rapide vanteco malpurigas animon kaj ĝin kaptas.

Kiom mi dezirus esti silentiginta multfoje kaj ne ĉeestinta meze de la homoj.

Sed kial do tiel volonte ni parolas kaj interparolas, kiam tamen tiel malofte okazas ke, sen vundo de l' konscienco, ni revenas al la silento?

Tial ke ni serĉas en tiuj interparoladoj konsolon reciprokan kaj helpon por nia koro, enuigita de diversaj pensoj.

Mi plezure parolas kaj okupas mian spiriton pri tio, kion mi amas, kion mi deziras aŭ kio kontraŭas al miaj deziroj.

2. Sed ofte, ho ve! vanege! ĉar tiu konsolo ekstera ne estas malgranda baro kontraŭ la konsolo interna de Dio donita.

Oni do bezonas observi kaj preĝi, por ke la tempo ne pasu senfrukte.

Se paroli permesite estas kaj decas, parolu tion kio povas edifi.

Malbona kutimo kaj maldiligento pri nia perfektigo malhelpas nin observi nian langon.

Tamen konversacioj piaj pri spiritaj aferoj, inter personoj laŭ Dio kunigitaj kaj spirit-similaj, helpas multe por progresadi en perfekteco.



DEKUNUA 'CAPITRO

*Pri la rimedoj por akiri la pacon
internan kaj pri
la zorgo antaŭeniri en la virto*

1. Ni povus ĝuadi grandan pacon, se ni volus neniel okupi nin pri tio, kion diras aŭ faras al aliaj homoj, kaj pri tio kio ne koncernas nin.

Kiel povas esti longtempe trankvila tiu, kiu sin embarasas pri zorgoj eksteraj, kiu deziras malŝpari sin kun aliaj, kaj iom aŭ malofte sin en si kolektas.

Feliĉaj la simpluloj, ĉar ili grandan pacon havos!

2. Kial kelkaj el Sanktuloj estis tiel perfektaj kaj meditantaj?

Tial ke ili penadis memmortigi

rilate al ĉiuj teraj deziroj, kiel eble plej kore unuigantaj kun Dio, kaj ili povis pri si libere sin okupi mem.

Ni male estas tro ensorbataj en niaj pasioj, kaj pri io ajn nedaŭreta maltrankvilaj.

Maloŝte ni tute venkas unu malvirton; varmetaj aŭ malvarmaj, ni ne fervoras al ĉiutaga progreseto.

3. Se ni estus en ni tute mortintaj, kaj malpli priokupataj, tiam ni povus ankaŭ Diajn aferojn ŝati, kaj ion senti de ĉiela vidaĵo.

La plej granda, la sola malhelpo estas ke, sklavigataj de niaj pasioj kaj avidecoj, ni neniel penadas por eniri en la perfektan vojon de l'Sanktuloj.

Kaj, se iafoje ni sentas ian kontraŭaĵon, tuj ni lasas debati nin, kaj alkuras al homaj konsoloj.

4. Se ni, kiel malavaraj militistoj, restadus firme batalantaj, ni certe vidus Dian helpon el Cielo super ni mal-suprenirantan.

Ĉar Li estas ĉiam preta por helpi kontraŭbatalantojn en Lia Amo konfidemajn. Li donas okazon batali por ke ni estu venkintaj.

Se nur en eksteraj praktikoj ni metas progresojn de l' Kristana viv-

ado, malmulte daŭra estos nia religio.

Ni almetu do hakilegon al la radikoj de l'arbo por ke, liberigitaj de l' pasioj, ni posedu pacan animon.

5. Se ĉiujare ni elradikigus unu malvirton, baldaŭ ni estus perfektaj.

Male tamen ni sentas ofte, ke pli bonaj ni estis, ĵus lasintaj la mondon, kaj nia vivado pli pura ol post multaj jaroj de profesio.

Ni devus ĉiutage fariĝi pli fervoraj kaj pli virtaj, kaj kontraŭe ni multe ŝatas esti konservintaj iom da fervoro.

Se ni perfortigus iomete, ni povus fari poste ĉion senĝene kaj ĝoje.

6. Malfacile estas forlasi siajn kutimojn, pli malfacile ankoraŭ sian volon devigi.

Se vi tamen nekapablaj estas venki vin en aferetoj, kiel vi venkos vin en aferegoj?

Kontraŭbatalu vian inklinon en la komenco; rompu tuj ian ajn malbonan kutimon, timante ke ĝi forlogu vin en pli gravaj malfacilaĵoj.

Ho! se vi pripensus kian pacon al vi, kian ĝojon al aliaj donus vivo deca, vi pli fervorus por via spirita progresado.

CAPITRO DEKDUA

Pri utilenco de malsanco

1. Bone estas al ni kelkafoje suferi tedojn kaj ĉagrenojn, tial ke tiuj ĉi ofte homon revokas al lia koro, memorigantaj plue ke li ekzila devas meti sian esperon en nenian mondan aferon.

Bone estas al ni ke ni toleru kontraŭ-dirojn iafoje, kaj ke oni pensu pri ni malbone aŭ kun malmulte da favoro, kiaj ajn bonaj estas niaj agoj, kaj intencoj; ofte tio taŭgas por nin igi humilaj kaj antaŭgardi kontraŭ vana gloro.

Ĉar ni plirapidas serĉi Dion, kiu vidas la fundon de ĉi koro, kiam la homoj ekstere.

homoj ekstere nin humiligas, kaj malbone pensas pri ni.

2. Tial homo devus en Dio tiel firmiĝi, ke li ne bezonus tiom da homaj konsoloj serĉi.

Kiam homo, kun rekta volo, estas konfuzata, tentata kaj malĝojigata pro malaj pensoj, li tiam rekonas, kiel necesa estas Dio, krom kiu li nenian bonon povas plenumi.

Tiam li malĝojiĝas, ĝemas, preĝas pro suferataj malfeliĉoj.

Tiam li enuas pli longe vivi, kaj deziras, ke venu la morto por ke, de siaj ligoj liberigita, li estu kun Jesu-Kristo.

Tiam ankaŭ li tute komprenas, ke perfekta sendanĝereco, plena paco ne estas en tiu ĉi mondo.



ĈĀPITRO DEKTRIA*Pri kontraŭbatalo al tentoj*

1. Tiel longé kiel ni tie ĉi tere vivas, ni ne povas esti liberigitaj de malĝojoj kaj turmentoj.

Ĉar estas skribita en Libro de Job : *tento estas tera vivo de homo.*

Ĉiu do devus antaŭgardi sin kontraŭ tentoj atakantaj, kaj maldormi preĝante por ke ne surprizu lin la demono, kiu neniam dormas, kaj ĉiuloke turniĝas, serĉante iun manĝegotan.

Neniu homo estas tiel perfekta kaj tiel sankta, kiu kelkfoje ne havas sentojn ; kaj ni ne povas esti tute liberigitaj de ĉiuj.

2. Sed, kvankam trudaj kaj penigaj, ili tamen estas tre ofte utilegaj al

homo, tial ke ili lin humiligas, purigas kaj instruas.

Ĉiuj Sanktuloj eksentis multajn tentojn kaj suferadojn, kaj tiamaniere progresis ;

Sed ilin Dio malaprobis, kiuj ne povis subteni tiujn turmentojn, kaj ili defalis sur la sankta vojo.

Nenia ordeno estas tiel sankta, nek t'el sekreta 'oko, ke oni tie ne trovos malĝojojn kaj turmentojn.

3. Homo, tiel longe kiel li vivas, neniam estas tute sirmata kontraŭ tentoj, kies ĝermon ni vere portas en ni, pro sentama deziro en kiu ni naskiĝis.

Kiam unu tento foriĝas, alia alvenas ; kaj ni ĉiam havos ion por suferi, tial ke ni perdis la bonon kaj samtempe la primitivan feliĉon.

Multaj deziras el tentoj foriĝi, kiuj pli grave falas en ilin.

Ne sufiĉas forkuri por venki, sed pacienco kaj humileco vera igas nin pli fortaj ol ĉiuj niaj malamikoj.

4. Kiu, ne tiregante la radikon de l' malbono, nur eksterajn okazojn evitas, malmulte progresados; al li pli rapide kaj pli forte la tentoj male revenos.

Pli certe vi venkos iom post iom helpita de Dio, kaj per longa pacienco, ol per obstineco forta kaj maltrankvila.

Ofte konsiliĝu en tento, kaj ne agu ŝenindulge kun tentato, kiun vi konsolos, kiel vi mem volus esti konsolata.

5. Komenco de ĉiuj tentoj estas ŝanĝemo de l' spirito kaj malgranda konfido al Dio.

Ĉar, kiel ŝipo sen direktilo estas tie ĉi kaj tie skuata per ondegoj, tiel homo malforta kaj ŝanĝema, kiu

forlasas siajn decidojn, estas agitata per diversaj tentoj.

Fajro provas feron, kaj justan homon tento. Ni ne scias ofte, kion ni povas, sed tento montras, kio ni estas.

Tamen ni bezonas esti maldormemaj, precipe komence de tento; ĉar oni venkas pli facile malamikon, kiam oni ne permesas, ke ĝi eniru en la animon, kaj kiam, en la momento mem kiam ĝi pretiĝas por eniri, ĝin oni repuŝas.

Tial antikvulo diris : devene kontraŭstaru malbonon; tro malfrue kuracilo venas, kiam per longaj templimoj malbono kreskis.

Unue simpla penso prezentigas al spirito, poste vivega imaĝo, kaj plezuro kune kun malreguligita moviĝo, fine konsento.

Tiel iom post iom tutan animon

eniĝas malamiko, kiam oni ne kontraŭbatalas ĝin komence.

Ju pli prokraste kaj malfortiĝe ĝin oni repuŝas, des pli oni ĉiutage malfortigas sin, kaj des pli malamiko kontraŭ ni fortiĝas.

6. Multaj toleras pli gravajn tentojn komence de sia konvertiĝo, aliaj fine.

Estas, kiuj dum sia tuta vivo suferas.

Kelkaj estas malserioze tentataj laŭ la ordo de Dio, kiu konas staton kaj meritojn de homoj, kaj por Liaj elektitoj ĉion aranĝas.


7. Kiam do ni estas tentataj, ni ne devas esperon forlasi, sed pli fervore Dion preĝi, por ke Li bonvolu helpi nin en ĉiuj niaj turmentoj; ĉar laŭ vorto de l' Apostolo Paŭlo, *li profitigos nin per la tento mem, por ke ni povu ĝin venki.*

Animojn niajn ni humiligu do sub la Dia mano, en ĉiuj niaj tentoj, ĉagrenoj, tial ke spiritajn humilulojn Li savos kaj relevos.

8. En tentoj kaj malhelpoj oni rekonas, kiel multajn progresojn homo faris. Pli granda estas merito, kaj virto plie montriĝas.

Facile estas ŝajni pia kaj fervora, kiam oni sentas nenion penigan; sed kia pacienco sin subtenas en malfeliĉa tempo, tiu grandan progreson esperigas.

Multaj venkas tentegojn kaj ĉiutage sub tenteloj falas, por ke, humiligitaj, neniam pri si mem al grandaj aferoj ili konfidu, kiuj en tiel malgrandaj faletas.



DEKKVARA 'CAPITRO

Hazardojn, juĝojn evitu

1. En vi mem atente rigardu, kaj zorgu ne juĝi la farojn de aliaj. Kiu juĝas la aliulojn, tiu senutile laciĝas, plej ofte trompiĝas kaj eraras multe, sed ekzamenante kaj juĝante sin, ĉiam frukte laboras.

Ordinare ni juĝas pri aferoj laŭ nia kora inklinado, ĉar memestimo subaĉetas en ni facile juĝan rektecon.

Se ni celus sole Dion, ni malpli multe konfuziĝus, kiam oni kontraŭstaras al nia sento.

2. Sed ofte estas ekster ni, aŭ en ni, io kaŝita, kio forlogas nin.

Multaj sekrete sin serĉas mem en tio, kion ili agas, kaj ili tion nescias.

Ili ŝajnas esti firmigitaj en paco,

kiam ĉio iĝas laŭ ilia deziro, sed se ili sentas kontraŭdirojn, tuj ili kortsuŝiĝas kaj malĝojas.

Diversaj opinioj kaŭzas ofte disputadojn inter amikoj, inter landanoj, eĉ inter religiuloj kaj piaj personoj.

3. Malnovan kutimon oni forlasas malfacile, kaj neniu volonte sin lasas konduki pli longe ol ĝia vidado vastiĝas.

Se vi sur propra spriteco kaj prudenteco vin apogas pli ol sur submetiĝo montrita de Jesu-Kristo, vi malmulte kaj malfruege kleriĝos en la spirita vivo, ĉar Dio volas, ke ni estu perfekte submetitaj al Li, kaj ke super ĉio per amo fervora ni altiĝu.



DEKKVINA 'CAPITRO

Pri la bonagoj faritaj pro karito

1. Pro nenio ajn, pro nenia homa amo, vi devas fari iun ajn malboneton. Oni devas tamen kelkfoje por utileco de iu malfeliĉulo prokrasti bonan agon, aŭ ĝin aliigi en pli bona, ĉar tiam bono ne estas detruata, sed pli granda fariĝas.

Neniu ago ekstera taŭgas sen karito, sed ĉio, kio fariĝas per karito, kia ajn estas, malgranda aŭ humiliga, produktas sufiĉegajn fruktojn; ĉar Dio malpli ŝatas agon, ol agan kaŭzon.

2. Tiu faras multe, kiu multe amas.

Tiu faras multe, kiu bone faras, kion ĝi faras.

Kaj tiu bone faras, kiu sian volon submetas al publika utileco.

Ofte ŝajnas karito, kio nur estas avideco, ĉar inklino natura, propra volo, espero pri rekompenco, profito antaŭvido, niajn agojn preskaŭ ĉiam influas.

3. Kiu veran kaj perfektan kariton posedas, sian utilecon ne serĉas, sed antaŭ ĉio deziras, ke tute fariĝu Dia volo; ĝi neniun envidas, tial ke ĝi amas nenian propran ĝojon, kaj ĝi ne volas en si ĝoji, sed en Dio super ĉiuj bonoj deziras sin feliĉigi.

Nenian bonon ĝi almetas al kreitaĵoj, sed ĉion direktas al Dio, el kiu, kiel el fonto, ĉiuj bonoj elfluas, en kiu ĉiuj Sanktuloj ĝojantaj ripozas en superega finiĝo.

Ho! al tiu, kiu havus fajron de l' vera amo, kiel vanaj ŝajnus ĉiuj teraj aferoj!

DEKSESA 'CAPITRO*Aliulajn difeklojn toleru*

1. Kion homo ne povas en si aŭ en aliaj korekti, tion li devas paciencie toleri ĝis kiam Dio ordonos alie.

Pensu ke pli bone estas eble tio, por provi vian paciencan, sen kiu viaj meritoj estas iometo.

Vi devas tamen preĝi Dion, ke Li vin helpu venki tiujn barojn, aŭ ilin suferi dolĉe.

2. Se iu, unufoje aŭ dufoje avertita, ne kapitulacias, kun ĝi ne disputadu, sed remetitu ĉion al Dio, kiu scias bonigi malbonon, por ke Lia volo fariĝu kaj gloriĝu en ĉiuj Liaj servistoj.

Penadu suferi paciencie la difektojn, kaj malfortiĝojn de aliuloj, kiajn ajn

ili estas, tial ke multaj estas en vi aferoj, kiujn aliuloj devas toleri.

Se vi ne povas igi vin tia, kia vi volus esti, kiel vi faros, ke aliuloj estu laŭ via volo?

Ni volas, ke aliuloj estu perfektaj, kaj ni ne korektas niajn difektojn.

3. Ni volas, ke oni riproĉu severe aliulojn, kaj ni mem ne volas esti riproĉataj.

Malplaĉas al ni tro granda libereco ĉe aliuloj, kaj ni volas, ke oni rifuzu nenion al ni.

Ni volas, ke oni detenu ilin per regularoj, kaj ni ne permesas, ke oni devigu nin pri la plej malgranda afero.

Oni klare vidas el tio, kiel malofte ni uzas la saman mezurilon por ni kaj por aliaj.

Se ĉiuj estus perfektaj, kion do ni estus suferontaj de aliuloj por Dio?

4. Sed tion Dio tiel ordonis, por ke ni lernu porti ŝarĝon unu de la alia, ĉar neniu estas sen ŝarĝo, neniu sen difektoj, neniu sin kontentigas mem, neniu estas sufiĉe saĝa por konduti sola, sed estas necese, ke ni toleru nin, konsolu niu, helpu nin, instruu nin, avertu nin reciproke.

Oni plej bone vidas en malfeliĉo kiom da virtoj ĉiu havas.

Ĉar la okazoj ne igas homon kaduka, sed montras lin tia, kia li estas.



DEKSEPA 'CAPITRO

Pri la religia vivo

1. Estas necese, ke vi lernu disrompi vin mem en multaj aferoj. se vi volas konservi pacon kaj harmonion kun aliuloj.

Ne estas iomete vivi en monaĥejo aŭ kunveno, kaj tie doni nenian okazon de plendo, persistante ĝis la morto.

Feliĉa kiu, post sankta vivado, sian kuradon tie konsumis.

Se vi volas esti firmigata kaj en virto kreski, konsideru vin kiel ekzilata kaj fremda sur la tero.

Estas necese ke vi, pro amo al Jesu-Kristo, [fariĝu malsaĝa laŭ la

mondo, se vi volas vivadi kiel religiulo.

2. Vesto kaj tonsuro malmulte taŭgas; sed la ŝanĝo de moroj, kaj la plena mortifiko de l' pasioj faras veran religiulon.

Kiu serĉas ion ajn, esceptinte Dion kaj sian animon, kiun li devas savi, tiu nur trovos turmenton kaj doloron.

Tiu ne povas ankaŭ restadi longe paca, kiu ne penadas esti malplej granda inter ĉiuj, kaj al ĉiuj submetita.

3. Vi venis por servi, ne por regi; eksciu do, ke vi estas alvokita por suferadi kaj laboradi, ne por paroladi en vana senokupeco.

Tie ĉi do la homoj estas elprovataj kiel oro en forno.

Tie ĉi neniu povas vivi, se li ne humiliĝas tutkore kaj volonte por Dio.

'CAPITRO DEKOKA*Pri ekzemplo de l' Sanktuloj*

1. Rigardadu la ekzemplojn de l' Sanktaj Patroj, en kiuj rebrilis la vera perfekteco de la religia vivo, kaj vi vidos, kiel malmulta, preskaŭ nenia estas, kion ni faras.

Ho ve! kia estas mia vivo, se mi komparas ĝin kun la ilia.

Sanktuloj kaj amikoj de Jesu-Kristo servis Dion en malsato kaj soifo, en malvarmo kaj nudeco, en laboro kaj laciĝo, en maldormoj kaj fastoj, en preĝoj kaj sanktaj meditoj, en multegaj persekutoj kaj insultoj.

2. Ho! kiom da multepezaj tormentoj suferis la apostoloj, konfessintoj, virgulinoj, kaj ĉiuj, kiuj volis

sekvi paŝojn de Jesu-Kristo ! Ĉar ili malamegis sian animon en tiu ĉi mondo, por ke ili posedu ĝin dum la eterneco.

Ho ! kian memforgesan kaj severmoran vivon ili vivadis en dezerto ! Ho ! kiel longajn kaj maldolĉajn tentojn ili suferis ! kiel ofte ili estas turmentitaj de malamiko ! kiel multajn kaj fervorajn preĝojn ili oferis al Dio ! kiel severegajn sindetenojn ili observis ! kiel granda fervoro, kia flameco por ilia progreso spirita ! kiel forta militado kontraŭ iliaj pasioj ! kiel puran kaj rektan intencion ili ĉiam direktis al Dio !

Ili tage laboradis, kaj nokte preĝadis ; kaj eĉ laborante ili ĉiam preĝadis spirite.

Ili tutan sian tempon uzis utile, ŝatante kiel mallonga ian ajn horon al Dio dediĉitan ; kaj tiom da dolĉ-

eco ili trovis meditante, ke ili for-
gesis korpajn necesecojn.

Riĉecojn ili forlasis, kaj gradojn,
honorojn, amikojn, parencojn; ili
nenion volis el mondo; ili prenis
apenaŭ tion, kio estos necesega por
vivo; ili malĝojis, eĉ necesece, zorgi
pri korpo.

Ili estis malriĉaj je teraj aferoj,
sed ili estis riĉaj je diaj favoroj kaj
virtoj.

Al ili ĉio mankis ekstere, sed interne
Dio fortigis ilin per sia favoro kaj
per siaj konsoloj.

4. Fremduloj ili estis por mondo,
sed ligataj al Dio kaj al Liaj kutimaj
amikoj.

Ili ŝajnis al si mem kiel nenio, kaj
la mondo malŝatis ilin; sed ili estis
amegataj de Dio kaj karegaj antaŭ
Li.

Ili vivadis en humileco vera, en

obeo sincera, en amo, en pacienco, kaj tiel ili ĉiutage fariĝis pli perfektaj kaj pli agrablaj al Dio.

Ili estas proponitaj kiel modeloj al ĉiuj veraj religiuloj, kaj ili devas instigi nin al perfektigo pli ol multaj varmetuloj al malfervoro.

5. Ho! kiel granda fervoro ĉe ĉiuj religiuloj en la komenco de ilia sankta institucio! Ho! kiel pia preĝo! kia virta superemo! kia severa disciplino; kiom da submetigo, kiom da respekto ĉiuj montris por la regularo de ilia fondinto!

Kio restas el ili, tio atestas ankoraŭ kiel tiuj estis sanktaj kaj perfektaj, kiuj venkis mondon tiel kuraĝe batalante.

Oni multe ŝatas hodiaŭ, ke religiulo ne malrespektas sian regularon kaj paciencie suferas jugon, kiun li akceptis.

6. Ho! varmeto, ho! maldiligenteco
de nia stato, kiu tiel rapide mal-
novan fervoron estingis inter ni!

Nun ĉio lacigas nian malkuraĝ-
econ, tiamaniere ke tedas nin la
vivo mem.

Al Dio plaĉu, ke virtema deziro
ne tute dormetu en vi, kiu tiel ofte
vidis ekzemplojn de veraj piuloj!



DEKNAŬA 'CAPITRO

Pri ekzercoj de bona religiulo

1. Vivo de bona religiulo devas esti plena de ĉiuj virtoj, tiamaniere ke li estu interne tia, kia li ŝajnas ekstere al homoj.

Kaj certe li bezonas esti interne multe pli perfekta ol li aperas ekstere, ĉar Dio rigardas nin, kaj ĉie kie ni estas, ni devas respektigi Lin profunde kaj en Lia ĉeesto, puraj kiel anĝeloj, antaŭeniri.

Ni devas ĉiutage renovigi nian decidon, instigi nin al fervoro, same kiel se konvertiĝo nia nur hodiaŭ komenciĝus, kaj diri :

« Helpu min, Sinjoro mia Dio, en propono kaj en sankta servo

kaŭzo, aŭ por utili al niaj fratoj, tiun malfruigon ni povos poste facile korekti.

Tamen se ni forlasas ilin senkaŭze pro anima tedo aŭ maldiligenteco, tio estas grava kaj nin pereiganta.

Ni do penadu kiel eble plej forte, facile tamen ni multe kulpiĝos.

Oni devas tamen ĉiam proponi al si ion precizan, pri tio precipe, kio nin malhelpas.

Ni devas ekzameni kaj reguligi niajn eksteron kaj internon, tial ke ili ambaŭ utilas al nia progreso.

4. Se vi ne povas kolektiĝi senĉese, kolektiĝu tamen intertempe, almenaŭ unufoje ĉiutage, matene aŭ vespere.

Proponu matene, kaj ekzameni vespere vian konduton; kiel vi kondutis tiutage en paroloj, agoj, pensoj, ĉar en tio vi ofendis eble Dion aŭ proksimulon.

Armu vin kiel militisto kontraŭ diablaj inspiroj; bridu malsobrecon, kaj vi haltigos pli facile ĉiujn aliajn karnajn dezirojn.

Neniam estu tute senokupa, sed legu aŭ skribu, aŭ preĝu, aŭ meditu, aŭ laboru ion ajn utilan al ĉiuj.

Oni bezonos tamen fari diskrete korpajn ekzercojn, kiuj ne konvenas al ĉiuj egale.

5. Kio ne estas komuneca, tio neniel devas aperi ekstere; pli sendanĝere estas plenumi sekrete privatajn ekzercojn.

Zorgu tamen ne esti mallaborema pri komunaj ekzercoj, kaj agema pri apartaj; sed, plenuminte fidele devojn ordonitajn, se ja restas ia tempo, vin al vi redonu laŭ via devota moviĝo.

Ĉiuj ne povas sekvi samajn ekzercojn; unu pli konvenas al tiu ĉi, alia al tiu.

Oni plezure diversigas ilin laŭ-
tempe; tiujn ĉi oni ŝatas plie en
festaj tagoj, tiujn en ordinaraj.

Unuaj utilas al ni en tento, aliaj
en paco kaj ripozo.

Alie ni volonte pensas, kiam ni
estas malĝojaj, alie kiam en Dio ni
ĝojas.

6. Okaze de ĉefaj festoj oni devas
renovigi piajn ekzercojn, kaj petegi
aprobojn de l' Sanktuloj.

De festo al festo ni intencu vivadi
kvazaŭ ni devus el tiu ĉi mondo el-
iri, kaj eternan feston eniri.

Kaj tial, en tiuj sanktaj tempoj,
zorge ni preparu plisanktiĝi mem,
kaj pli precize regularon obei, kvazaŭ
ni devus apud Dio baldaŭ ricevi pre-
mion de nia laboro.

7. Kaj se tiu momento estas pro-
krastata, ni kredu, ke ni ne estis anko-
raŭ sufiĉe pretaj, nek indaj je grand-

ega gloro, kiu estos malkovrata al ni en antaŭfiksita tempo, kaj ni penadu kiel eble plej bone prepari tiun nian eliron.

Feliĉa la servisto, diras Sankta Luko, kiun la Sinjoro trovos maldormantan. Mi vere diras al vi, Li starigos tiun ĉi super ĉiuj siaj bienoj.



DUDEKA 'CAPITRO

Pri amo al soleco kaj silento

1. Serĉu favoran tempon, en kiu vi povos vin utile pri vi mem okupi, kaj ofte pripensu pri Diaj bonfaroj.

Forlasu kuriozajn aferojn ;

Tion tralegu plivole, kio pli kortsuŝas ol kio spiriton amuzas.

Forprenu superfluajn paroladojn, senutilajn kuradojn ; ne aŭskultu vanajn bruojn de l' mondo, kaj vi trovos sufiĉe da libertempo por sanktaj meditoj.

Plej grandaj Sanktuloj kiel eble rilatojn homajn evitis, kaj pliamis sekrete vivi kun Dio.

Antikvulo diris : « Ĉi foje kiam mi estis inter homoj, malpli homo

mi revenis. Tion ofte ni sentas, kiam ni interparoladas longatempe.

Pli facile estas silenti, ol ne trograndigi per paroloj.

Pli facile estas hejme restadi, ol gardi sin ekstere.

Kiu do intencas vivon eternan kaj spiritan atingi, tiu devas kun Jesuo malproksimiĝi el homamaso.

Neniu senriske aperas, kiu ne volonte sin kaŝas.

Neniu mezure parolas, kiu ne volonte silentas.

Neniu sendangere ordonas. kiu ne lernis obei.

3. Neniu senriske ĝojas, kiu ne posedas en si ateston de bona konscienco.

Ĉiam tamen la konfido de l' Sanktuloj estis plena de Dia timo.

Kiaj ajn estis brilaj iliaj virtoj, kiaj ajn sufiĉegaj iliaj favoroj, ili ne

estis malpli humilaj aŭ malpli viglaj.

La sentimeco de l'malbonuloj male naskiĝas el malhumileco kaj tromemfido, kaj en blindeco finiĝas.

Neniam promesu al vi sendanĝerecon en tiu ĉi vivo, kvankam vi ŝajnas esti sankta religiulo aŭ pia dezertulo.

4. Ofte plej bonaj en estimo de homoj estis multege danĝeraj pro sia tro granda konfido.

Utilas do al multaj esti ne tute senigataj de tentoj, kaj oftajn atakojn suferi el timo ke, trankvilaj en si mem, ili malhumilece altiĝas, aŭ tro inkliniĝas al eksteraj konsoloj.

Ho! kiu neniam serĉadas nedaŭrajn ĝojojn, kiu neniam sin okupas pri mondo, kiel puran konsciencon tiu konservas!

Ho! kiu forprenus ĉiun ajn vanan zorgemon, pripensante nur savon

kaj Dion, kaj en Dio fondus tutan sian esperon, kiel grandan pacon tiu posedus !

5. Neniu estas inda je ĉielaj konsoloj, se ĝi ne diligente sin ekzercadis en sankta doloro.

Se vi deziras vere pentantan koron, eniru vian ĉambreton kaj elpelu la mondan bruon, laŭ tiu sentenco : estu koro via plena de doloro.

Vi trovos ofte en via ĉambreto, kion vi perdos ekstere.

Ĉambreto, kiun oni malofte lasas, fariĝas dolĉa; malbone gardata ĝi tedomaskas.

Se tuj kiam vi eliras el mondo, vi loĝas en ĝi fidele, ĝi iĝos al vi kiel amikino kara, kaj estos samtempe via plej dolĉa konsolo.

6. En silento kaj ripozo multe progresadas animo pia, kaj ĝi peentras

misterojn sekretajn de Sankta Skribo.

Tie ĝi trovas la fonton de larmoj, per kiuj ĝi ĉiunokte sin lavas kaj puriĝas, kaj kuniĝas kun sia Kreinto, tiom pli familie kiom ĝi vivas pli malproksimigita el monda tumulto.

Kiu do disiĝas el siaj konatoj kaj amikoj, tiun Dio alpaŝos kun sanktaj anĝeloj.

Pli bone estas kaŝiĝi kaj zorgi pri animo ol fari miraklojn kaj ne zorgi pri si mem.

Laŭdinde estas, ke religiulo malofte foriru, malamu esti vidata kaj eĉ ne volu vidi homojn.

7. Kial vi volas vidi, kion vi ne povas rajte posedi? mondo pasas kaj samtempe ĝia deziremo.

Sentaj deziroj tien ĉi kaj tien forlogas, sed kiam la horo pasis, kion alportas ili, se ne pezan konsciencon kaj malŝparitan koron?

Tial ke oni eliris en ĝojo, oni revenas ofte en malĝojo, kaj ĝoja vespero matenon malĝojigas.

Tiel eniĝas dolĉe ĉiu senta ĝojo, sed fine ĝi vundas kaj mortigas.

8. Kion vi povas aliloke vidi, kion vi ne vidas tie ĉi ? Jen estas ĉielo, tero, ĉiuj elementoj ; el ili ĉio estas farita.

Kien ajn vi iros, kion vi povas vidi longe sub suno persista.

Vi kredas eble vin satigi, sed vi neniam bone sukcesos.

Kiam ĉion vi vidus kune, kio tio estus se ne vana vidaĵo !

Levu supren okulojn al Dio, kaj preĝu pro viaj pekoj kaj maldiligentoj.

Vanajn aferojn al vanuloj lasu, sed nur okupu vin pri tio, kion Dio ordonis al vi.

Fermu post vi pordon, alvoku Jesuon, vian karegulon.

Restadu kune kun li en via ĉambreto, ĉar vi nenie trovos tiel grandan pacon.

Se vi ne estus foririnta, kaj aŭdinta kelkan el mondaj famoj, vi estus persistinta en tiu ĉi dolĉa paco, sed ĉar vi plezure novaĵojn aŭdas, estas necese ke vi poste suferu koran tumulton.



DUDEKUNUA 'CAPITRO

Pri kora sanktmalĝojiĝo

1. Se vi volas iomete progresi, konservu vin en la Dia timo, kaj ne estu volonte tro libera ; sed sub severan disciplinon submetu viajn sentojn, kaj ne liveru vin al malprudentaj ĝojoj.

Donu vin al kora sanktmalĝojiĝo, kaj vi trovos veran piecon.

Ĉar tiu ĉi sanktmalĝojiĝo multajn elfaras bonojn, kiujn oni perdos baldaŭ, forlasante sin al vanaj koraj moviĝoj.

Strange estas, ke en tiu ĉi vivo perfekte ĝoji povu homo, kiu konsideras sian ekzilon kaj tiom da danĝeroj por sia animo.

2. Pro nia kora malseriozeco, kaj maldiligenteco pri niaj difektoj, animajn dolorojn niajn ni ne sentas, kaj ofte ni ridas vane kiam ni devus rajte plori.

Vera libereco aŭ firma ĝojo nur estas en la dia timo, kaj bona konscienco.

Feliĉa kiu povas forigi ĉiun malhelpan distrecon, kaj tute kolekti sin en sankta malĝojiĝo.

Feliĉa kiu forpelas el si ĉion, kio povas konsciencan malpurigi aŭ pezigi.

Batalu grandanime, kutimo kutimon venkas.

Se vi scias lasi homojn, ili lasos vin fari kion vi volos.

3. Ne altiru al vi la aferojn de aliuloj, kaj ne embarasiĝu pri tiuj de granduloj.

Malfermata estu via okulo unue

super vi, kaj vin riproĉu mem,
antaŭ ol viajn amikojn riproĉi.

Se vi ne havas homajn favorojn
ne malĝojiĝu pri tio ; al vi nur
estu grava tio, ke vi ne vivis tiel
bone kaj singardeme, kiel decas al Dia
servisto kaj bona religiulo.

Pli utile estas ofte kaj pli sendan-
ĝere ke homo ne havu, precipe laŭ
sentemo, multajn konsolojn en tiu ĉi
vivo.

Tamen, se ni estas senigataj je
diaj konsoloj, aŭ se ni malofte sentas
ilin, ĉi ni kulpiĝas mem, ĉar ni ne
serĉas la koran sankt-malĝojiĝon,
kaj ni ne elĵetas tute vanajn eksterajn
konsolojn.

4. Konfesu ke vi estas malinda je
ĉielaj konsoloj, kaj multe pli inda je
gravaj turmentoj.

Kiam homo estas perfekte sankt-
malĝojigata, la tuta mondo ŝajnas

maldolĉa kaj netolerebla al li.

Justulo ĉiam trovas sufiĉan materion por malĝoji kaj plori.

Ĉar konsiderante sin mem, aŭ aliajn, li scias ke neniu tie ĉi vivas senigata je turmento; kaj ju pli atente li rigardas sin, des pli profunde li doloriĝas.

Kaŭzo de justa doloro kaj de interna sankta bedaŭro estas niaj pekoj kaj malvirtoj, en kiujn ni estas tiel entombigitaj, ke malofte ni povas rigardadi ĉielajn aferojn.

5. Se vi pli ofte pripensus pri via morto ol pri viva longeco, sendube vi pli fervore korektiĝus.

Kaj se vi pripensus pli serioze pri punoj inferaj kaj purgatoriaj, mi kredas ke vi tolerus volonte doloron kaj laboron kaj nenian severmoron timus.

Sed tial ke tiuj veroj ne eniĝas ĝis

nia koro, kaj ĉar ni amas ankoraŭ flatojn, tial ni restadas malvarmaj kaj maldiligentaj.

6. Ofte pro anima malfortiĝo [tiel facile plendas nia mizera karno,

Preĝu do humile la Sinjoron por ke Li donu al vi pentan spiriton, kaj diru kun profeto : « Nutru min, Sinjoro, per pano de larmoj ; trinkigu min per larmoj en kaliko.



DUDEKDUA ĈAPITRO*Konsiderado pri homa mizero*

1. Mizerulo vi estos, kie ajn vi loĝos, kaj kien ajn vi irados, se vi ne revcnos al Dio.

Kial vi konfuziĝas, ĉar nenio sukcesas laŭ via deziro, laŭ volo via? Al kiu ĉio prosperas precize? Nek al vi, nek al mi, nek al iu ajn sur tero.

Neniu estas, en tiu ĉi mondo, libera de timegoj aŭ turmentoj, eĉ se ĝi estas reĝo aŭ papo.

Kiu do plej bonan sorton havas? Tiu ja, kiu pro Dio scias ion suferi.

2. Diras multaj malfortuloj kaj malkleruloj : « Kiel feliĉan vivon

havas tiu homo ! Kiel li estas riĉa,
kiel potenca ! kiel alta ! kiel granda
kaj bela !

Sed konsideru la ĉielojn, kaj vi
vidos, ke ĉiuj tiuj tempaj bonoj estas
senvaloraj ; kiuj ĉiam tre necertaj
aperos plie kiel laciganta pezo, ĉar
neniam ilin ni posedas sen malkvieto
kaj sen timo.

Tempajn bonojn sufiĉege posedi
ne faras homan feliĉon ; mezbono
sufiĉas.

Vere grandega mizero estas tere
vivi.

Ju pli homo deziras autaŭneniri en
spiritaj vojoj, des pli la nuntempa
vivo fariĝos maldolĉa al li, tial ke li
pli bone sentas kaj pli klare vidas
malfortecon kaj putriĝon de la homa
naturo.

Manĝi, trinki, maldormi, dormi,
ripozi, labori, suferi ĉiujn naturajn

necesecojn, estas vere mizerego, kaj granda malĝojo al piulo, kiu volonte estus malligata el teraj ligiloj, kaj liberigata de ĉiu peko.

3. Ĉar interna homo strange multepeziĝas en tiu ĉi mondo per korpaj necesoj.

Kaj tial la Profeto fervore petas, ke li estu liberigata de ili, dirante :
« *Liberigu min de miaj necesecoj, Sinjoro !* »

Ve do al tiuj, kiuj ne konas sian mizeron ! Ve ankoraŭ plie al tiuj, kiuj amas ĉi tiun mizeran kaj pere-eman vivon.

Car estas, kiuj tiel avide ĝin ĉirkaŭprenas, ke kvankam akirante necesojon nur per laboro aŭ almozpeto, ili tamen, se nur ili povus ĉiam vivi, neniel zorgus pri ĉiela regno.

4. Ho ! malsaĝaj kaj malfidelaj

koroj, kiuj tiel profunde interniĝis en terajn aferojn, ke ili nenion ŝatas, se ne karnon.

La malfeliĉuloj ! ili fine dolore sentos kiel malnobla, kiel nenia estas tio, kion ili amis.

Sed la Sanktuloj de Dio, kaj ĉiuj fidelaj amikoj de Jesu-Kristo tion malŝatis, kio flatas karnon kaj tiu-monde brilas ; male, tuta ilia espero, ĉiuj iliaj deziroj sopiris al eternaj bonoj.

Ilia koro tute altiĝis al bonoj nevideblaj kaj senmortaj, por ke ili ne estu teren mallevigataj pro amo al videblaj aferoj.

5. Ne perdu, frato mia, konfidon antaŭeniri en la spirita vivo ; vi havas ankoraŭ tempon kaj horon.

Kial prokrastas vi ĉiam viajn decidojn ? Leviĝu, kaj tuj komencu, dirante : « Jen estas momento agi ; jen

estas momento batali, jen momento korektiĝi.

Kiam al vi estas peza kaj maldolĉa la vivo, tiam estas la tempo por meriti.

Necese estas trapasi fajron kaj akvon, antaŭ ol eniri refreŝigejon.

Vin mem se vi ne perfortos, malvirton vi ne venkos.

Tiel longe kiel ni portas tiun kadukan korpon, ni ne povas esti sen peko, nek sen tedo kaj doloro.

Estus al ni dolĉe ĝui ripozon liberigitan de ĉiu mizero, sed perdinte senkulpecon per peko, ni perdis ankaŭ veran feliĉecon.

Estas do necese, ke ni persistu en pacienco, kaj atendu dian kompaton ĝis maljusteco pasos kaj ĉio mortema en ni estos ensorbita de vivo.

6. Ho! kiel granda estas homa kadukeco, kiu ĉiam inkliniĝas al malbono!

Hodiaŭ vi konfesas viajn pekojn ;
ilin morgaŭ vi ree faros.

Vi nun intencas zorgi pri vi mem,
kaj vi agas post unu horo kvazaŭ
vi nenion intencis.

Ni povas do vere nin humiligi mem,
kaj neniam pri io granda fieriĝi, tiel
kadukaj ni estas kaj ŝanĝemaj.

Ni povas rapide per maldiligenteco
tion perdi, kion ni ĵus akiris per dia
graco kaj multa laboro.

7. Kio pri ni fariĝos en la fino de
l'tago, kiam ni tagiĝe tiel malfortiĝas.

Ve al ni, se ni volas ĝui ripozon
kvazaŭ ni estas en paco kaj espero,
kiam en nia vivado ne aperas ia ajn
ŝajno de vera sankteco.

Ni bezonus do esti pli instruitaj,
kaj formitaj al novaj moroj, kiel
obeaj lernantoj, por provi almenaŭ
se en ni estus kelka plibonigebleco
kune kun pli granda virta progreso.

DUDEKTRIA 'CAPITRO

Meditado pri la morto

1. Estos rapidege tie ĉi finita pri vi, vidu do en kia stato vi estas ; homo estas hodiaŭ, kaj morgaŭ ne aperas plu.

Kaj malaperinte el niaj okuloj, ĉi elpasas rapidege el nia spirito.

Ho ! malsprita malamemo de l'homa koro, kiu nur pensas pri estanteco kaj estontecon ne antaŭvidas.

En ĉiuj viaj agoj, en ĉiuj viaj pensoj, vi devus tia esti, kia se vi estus tuj mortonta.

Se bonan konsciencon vi havus, vi malmulte morton timus.

Pli bone estus pekon eviti, ol forkuri morton,

Se vi ne estas hodiaŭ preta, kiamaniere morgaŭ vi estos tia.

Morgaŭ estas tago ne certa; kaj kiu scias se morgaŭian tagon vi havos.

2. Por kio taŭgas longe vivadi, se tiel malmulte ni korektiĝas.

Ha! longa vivo ne ĉiam korektas, pli ofteniajn krimojn ĝi pligrandigas.

Plaĉu al Dio, ke ni estu bone vivintaj nur unu tagon en tiu ĉi mondo.

Multaj kalkulas jarojn de ilia konvertiĝo; sed ofte malmulta estas la frukto de ilia ŝanĝiĝo.

Se terure estas morti, eble pli danĝere estas longe vivi.

Feliĉa tiu, kiu horon de sia morto ĉiam havas antaŭ okuloj! kiu ĉiutage pretiĝas por morti!

Se vi kelkafoje vidis mortantan homon, pripensu ke vi saman vojon trapasos.

3, Matene, pripensu ke vi ne atingos

vesperon; vespere, ne kuraĝu morgaŭan matenon al vi promesi.

Estu do ĉiam preta, kaj tiamaniere vivadu, ke neniam morto vin trovu nepreta.

Multaj subite kaj senprepare mortas, ĉar en la horo ne atendita, la Filo de l' Homo venos.

Kiam alvenos tiu lasta horo, vi ekjuĝos tut-alie pri via fininta vivo, kaj vi multege bedaŭros esti tiel estinta maldiligenta kaj malkuraĝa.

4. Kiel feliĉa kaj saĝa tiu estas, kiu penadas iĝi tia, kia li deziras esti en horo de l' morto.

Al mortonto grandan konfidon ja donos perfekta malestimo al mondo, fervora deziro progresi en virto, amo al regulo, penta laboro, obea rapideco, memforĝeso de si, kaj konstanteco suferi ĉiujn ajn kontraŭaĵojn pro amo al Jesu-Kristo.

Multan bonon vi povas elfari, dum vi estas sana; sed malsana, mi ne scias, kion vi povos.

Malmultaj estas, kiuj per malsano fariĝas pli bonaj; malmultaj simile, kiuj per oftaj pilgrimoj sanktiĝas.

5. Ne konfidu al viaj amikoj aŭ proksimulo, kaj ne prokrastu vian savon estontece; ĉar homoj forgesas vin pli rapide ol vi pensas.

Pli bone estas vin provizi nun, kaj iom da bonfaro sendi antaŭ vi, ol konfidi al helpo de aliuloj.

Se vi neniel zorgas nun pri vi mem, kiu estontece pro vi maltrankviliĝos?

La nuna tempo estas multekosta : Jen estas favora tempo, sava tago.

Sed ho ve ! kial tiel vane vi uzas tiun tempon, kiu taŭgus por meritiĝi al vi eternan vivon.

Venos tempo, en kiu vi deziros unu tagon, unu horon, por purigi vian

animon, kaj mi ne scias, ĉu vi ĝin ricevos.

6. Ha! frato mia, de kia danĝero, de kiel terura timo vi povus liberiĝi, se vi ĉiam estus de nun en la timo de l' morto.

Penadu vivi de nun tiamaniere ke, en morta horo, vi povu plivole ĝoji ol timi.

Lernu mortiĝi nun je mondo, por ekvivi kun Kristo.

Lernu malestimi nun ĉion, por ke vi povu libere iri al Kristo.

Punu vian korpon nun per pento, por ke vi povu tiam havi fortikan konfidon.

7. Ha! frenezulo, kiel esperas vi longan vivadon, kiam vi ja nenian certan tagon havas.

Kiel multaj estas trompigitaj, kaj subite tiregitaj el sia korpo!

Kiom da fojoj vi parolantojn aŭdis:

« Tiu homo estas mortigita per glavo, tiu ĉi dronis; tiu disrompiĝis falante de alta loko; unu mortis manĝante, alia ludante; unu pereis per fajro, alia per fero, alia per pesto, alia per la mano de ŝtelistoj. »

Kaj tiel fino de ĉiuj estas morto, kaj homa vivo pasas kiel ombro.

8. Kiu memoros vin mortintan? Kaj kiu preĝos por vi? Ĉar vi ne ŝcias, kiam vi mortos, nek kio vin sekvos post morto.

Dum vi havas tempon, amasigu senmortajn riĉecojn.

Krom via savo, pri ĉeno pensu; nur okupu vin pri diaj aferoj.

Faru nun amikojn al vi, honorante la Sanktulojn, kaj imitante iliajn agojn por ke, kiam vi estos subfalinta, ili ricevu vin en eternajn loĝejojn.

9. Vivu sur tero kiel vojaĝanto kaj

fremdulo, kiu neniel maltrankviliĝas pri mondaj aferoj.

Gardu vian koron libera kaj altigita al Dio, ĉar vi ne havas tie ĉi loĝejon persistan.

Al ĉielo sendu preĝojn kaj ĉiutagajn ĝemojn kune kun larmoj, por ke animo via meritu post morto feliĉe alveni al Sinjoro.



DUDEKKVARA 'CAPITRO

Pri juĝo kaj puno de l' pekuloj

1. En ĉio konsideru finon ; kaj kia-
maniere vi aperos antaŭ la severa
juĝisto, al kiu nenio estas kaŝita ;
kiun oni ne delogas per donacoj, kaj
kiu ne akceptante senkulpigojn, laŭ
justeco juĝos.

O mizerega kaj malsaĝa pekulo !
kion vi respondos al Dio, scianta
ĉiujn viajn krimojn, vi kiu timegas
iafoje la rigardon de koleriĝanta
homo.

Kial vi ne pretiĝas al tiu juĝotago,
kiam neniu povos esti senkulpigita
aŭ defendita de aliulo, sed ĉiu estos
al si mem sufiĉa pezo.

Fruktodona nun estas via laboro,

akceptataj viaj larmoj, aŭdataj viaj ĝemoj; doloroj viaj taŭgas por elpago kaj vin purigas.

2. Grandan kaj savan purgatorion havas homo pacienca, kiu, tolerante insultojn, pli malĝojas pri aliula malico ol pri sia ofendo; kiu volonte preĝas por siaj kontraŭuloj, pardonante tutkore iliajn kulpojn; kiu tuj petas aliulojn pri pardono; kiu inkliniĝas pli al kompato ol kolero; kiu sin perfortas mem, kaj penadas por tute submeti sian karnon al spirito.

Pli bone estas nun puriĝi pri pekoj, kaj forpreni malvirtojn ol ilin rezervi punotajn en estonteco.

Ni vere trompiĝas mem pro ne-reguligita amo, kiun ni havas por korpo.

3. Kion alian konsumas venĝanta fajro, se ne viajn pekojn?

Ju pli multe vi nun indulgas je vi mem, obeante karnon, des pli severege vi estos punata, rezervante pli multan materion al fajro.

En kiuj aferoj pli pekinta estos homo, en tiuj li estos pli grave punita.

Tie malhontemuloj kaj voluptemuloj estos enĵetataj en bruligantan peĉon, kaj sulfuron malbonodoran; kaj enviuloj, pro troa doloro, kiel furiozaj hundoj, kriegos.

4. Ĉiu malvirto sian punon havos. Tie malhumiluloj estos plene konfuzigataj, kaj avarulo mizeregan malriĉecon suferos.

Tie unu horo estos pli netolerebla en puno, ol tie ĉi cent jaroj en plej severega pento.

Tie nenia ripozo, nenia konsolo al damnatoj; tie ĉi kontraŭe ĉesas iafoje laboro, kaj oni konsoliĝas kun amikoj.

Nun estu do maltrankvila kaj malĝojigata pro viaj pekoj, por ke, en la juĝotago, vi estu sendanĝera kun feliĉeguloj.

Ĉar tiam justuloj stariĝos kun granda konfido kontraŭ tiuj, kiuj estos subpremintaĵ inlin kaj malestimintaĵ. (Sag. V. 2)

Tiam tiu leviĝos por juĝi, kiu nun humile submetiĝas al homaj juĝoj.

Tiam grandan konfidon havos malriĉulo kaj humilulo; kaj fierulo tute tremos.

Tiam oni vidos, ke tiu saĝa estis en tiu ĉi mondo, kiu pro Kristo lernis esti malprudenta kaj malŝatita.

6. Tiam plaĉos ĉiu malĝojo paciencie suferita, kaj ĉiu maljusteco fermos sian buŝon. (Ps. CVI, 42)

Tiam ĝojos ĉiu piulo, kaj malpiulo malĝojos.

Tiam pli gojegos karno mortiĝinta,
ol delikate ĉiam nutrita.

Tiam brilos maldelikataj vestoj,
kaj ŝtofoj delikataj malhelos.

Tiam malriĉa pajlo-tegita dometo
pli valoros ol orbrila palaco.

Tiam konstanta pacienco pli utilos
ol la tuta potenco de l' homo.

7. Tiam pli laŭdegata estos obeo
simpla, ol la tuta potenco de l' cent-
jaro.

Tiam pli ĝojigos pura kaj bona
konscienco ol scienca filozofio.

Tiam pli pezos malestimo al riĉecoj,
ol ĉiuj trezoroj teraj.

Tiam fervora preĝo pli bone kon-
solos vin ol delikata festeno.

Tiam obstina silento pli ĝojigos
vin ol longaj interparoloj.

Tiam pli valoros sanktaj agoj ol
multaj belaj paroloj.

Tiam pli plaĉos severmora vivo

kaj malfacila pento ol ĉiuj nunaj terplezuroj.

8. Lernu do suferi nun malseriozajn malbonojn, por eviti pli gravajn.

Tion unue provu tie ĉi, kion suferi poste vi povos.

Se vi nun preskaŭ nenion suferi povas, kiel vi toleros eternajn turmentojn.

Se malgranda doloro ŝajnas al vi nun netolerebla, kiel vin impresos inferaj punoj?

Jen estas, vi ne povas havi du feliĉojn : tie ĉi ĝoji en mondo, kaj poste reĝi kun Kristo.

Kiam vi estus ĝis nun vivinta en honoroj kaj plezuroj, por kio ĉio taŭgus, se tuj okazus via morto.

9. Ĉio do vantaĵo estas (Ekl. I, 2), krom ami Dion kaj servi Lin solan.

Kiu vere Dion tutkore amas, tiu nek morton timas, nek turmentojn,

nek juĝon, nek inferon, tial ke perfekta amo certan aliron donas apud Dion.

Sed se oni amas ankoraŭ pekon, ne mirige estas ke oni timu morton kaj juĝon.

Bone estas tamen, se amo ne deturnas vin el malbono, ke almenaŭ vin haltigu infera timo.

Kiu vere dian timon postmetas, tiu ne povos longe persisti en virto, sed baldaŭ falos en demonajn kaptilojn.



DUDEKKVINA 'CAPITRO

*Pri fervoro necesa por plibonigi nian
vion*

1. Estu vigla kaj fervora, servante Dion, kaj vin ofte demandu : kial vi venis tien, kial vi lasis *mondon* ?

Cu ne estas por vivi sankte kun Dio, kaj iĝi spirita homo ?

Fervore do penadu al virta progreso, tial ke baldaŭ vi ricevos rekompenccon pro viaj laboroj ; kaj tiam ne estos plu timo aŭ doloro.

Nun malgrande vi laboros ; kaj grandan ripozon, plie ĝojon eternan vi trovos.

Se vi fidela kaj fervora persistas en viaj agoj, Dio sendube estos fidela kaj malavara en rekompenco.

Vi devas konservi bonan esperon, ke vi alvenos al ĉielo; sed vi ne devas tromemfidi por ke vi ne farigu tro malkuraĝa aŭ malhumila.

2. Homo, kiu ŝanceliĝis ofte inter timo kaj espero, iam estante subpremata pro malĝojo, preĝejon eniris; kaj tie teren kuŝiĝanta antaŭ altaro, preĝante diris: « Ho! se mi scius ke mi devos persisti! » Kaj tuj li aŭdis interne tiun dian respondon: « Tion se vi scius, kion vi volus fari? Faru nun kion vi tiam farus, kaj vi estos plene trankvila. »

Tial konsolita kaj fortigita, tiu homo konfidis al volo dia, kaj lia maltrankvileco ĉesis.

Li ne volis plu tion serĉadi, kio okazos estontece, sed li penadis koni pli bone volon kaj deziron de Dio por komenci kaj fini ĉiuspecajn bonajn agojn.

3. Esperu en Dio, kaj faru bonon, diris la Profeto; loĝu sur tero, kaj vi estos nutrata per ĝiaj riĉecoj (Ps. XXXVI, 3).

Io malhelpas multajn homojn korektiĝi kaj fervore progresadi; tio estas timo de malfacilaĵoj, kaj laciĝo de bataloj.]

Efektive tiuj superas aliulojn pri pieco, kiuj plej vire penadas tion venki, kio plej peniga estas al ili, kaj kontraŭa.

Ĉar homo tiom pli progresadas kaj meritas pli grandan favoron, ke li pli venkas sin mem, kaj spirite mortigas.

Sed ĉiuj ne estas egale devigataj multe sin venki kaj mortigi.

Fervoregulo tamen, kiam li havus multajn pasiojn, pli rapidege sukcesos ol aliulo modera, sed pli varmeta.

Du rimedoj precipe taŭgas por iĝi pli bona : sin elŝiri perforte el naturaj malvirtaj inklinoj, kaj fervore serĉadi virton, kiun oni plej bezonas.

4. Pli zorge ankaŭ penadu por eviti kaj venki ĉiujn difektojn, kiuj al vi plej malplaĉas en aliuloj.

Kunprenu ĉie vian profiton; kaj se vi bonajn ekzemplojn aŭdas aŭ vidas, ilin imitu fervore.

Se kontraŭe vi vidos ion riproĉotan, tion zorgu ne fari; aŭ se ĝi okazis iafoje, korektu vin rapide.

Kiel okulo via rigardas aliulojn, tiel ankaŭ de aliuloj vi estos rigardata.

5. Kiel estas dolĉe kaj agrable vidi religiulojn fervorajn kaj piajn, bone akuratajn kaj regulajn.

Kiel malagrable kaj ĉagrenige estas multajn el ili vidi malregule vivantajn, forlasantajn siajn devojn.

Kiel danĝere estas ne zorgi pri religia celo, kaj doni sin al malpermesitaj aferoj!

Memoru pri faritaj promesoj, kaj rigardu Jesuon krucumitan.

Vi devas honti vere, konsiderante la vivon de Jesu-Kristo, ĉar vi ne penadis ankoraŭ konformigi la vian al la Lia, post tiel longa tempo, kiam vi eniris la dian vojon.

Religiulo, kiu sin okupas atente kaj piece mediti la sanktegan vivon kaj suferadon de l' Sinjoro, tie trovas sufiĉege ĉion al si utilan kaj necesan, nek bezonas ion pli bonan deziri krom Jesuo.

Ho! se Jesuo krucumita vivus en nia koro, kiel rapide kaj sufiĉe ni estus instruitaj!

7. Fervora religiulo akceptas kaj ĝoje plenumas ĉion, kio estas ordonita al li.

Religiulo senzorga kaj varmeta multajn malĝojojn sentas, kaj ĉiuloke suferas turmentojn, tial ke mankas al li konsoloj internaj, kiujn ekstere li ne povas serĉi.

Religiulo vivanta ekster regularo pretigas al si grandan elreviĝon.

Kiu serĉas oportunecon kaj molcon, tiu ĉiam estos en turmentoj, tial ke aŭ unu aŭ alia afero al li malplaĉos.

8. Kiamaniere agas tiel multaj aliaj religiuloj, kiuj sekvas en monakejo severmoran disciplinon?

Ili malofte foriras kaj vivas abstrakte; ili nutriĝas malriĉege, kaj maldelikate vestiĝas; ili multe laboras kaj malmulte parolas; ili longtempe maldormas kaj stariĝas matene; ili daŭrigas preĝojn, legas ofte, kaj gardas sin en tuta disciplino.

Vidu Ĉartrulojn, Cisterciulojn, monaĥojn kaj monakinojn de diversaj ordenoj, kiuj ĉiunokte leviĝas por kanti la laŭdojn al Dio.

Estus do hontinde vin montri mallaborema en tiel sankta ekzerco, je horo kiam tiel multaj aliaj fratoj ĝoje Dion eklaŭdas.

9. Ho! se nenion alian vi devus fari, se ne kore kaj buŝe laŭdi la Sinjoron nian Dion!

Se neniam vi bezonus manĝi, trinki, dormi, povante ĉiam beni Dion kaj okupiĝi je spiritaj ekzercoj, vi estus multe pli feliĉa ol nuntempe, kiam vin sklavigas ĉiuj korpaj necesajoj.

Estu volinta Dio ke, afrankitaj je tiuj ĉi bezonoj, ni estus nutrontaj nur nian animon; spirita nutraĵo, kiun, ho ve! tre malofte nigustumas.

10. Kiam homo alvenis al tio, ke

li petas nenian kreitajon pri ia ajn konsolo, tiam li perfekte Dion ek-gustumas, kaj konsentiĝas pro ia ajn okazo.

Tiam lin nek ĝojigas sufiĉego, nek malĝojigas malboneto, sed li sin metas tute kaj konfide en la manojn de Dio, kiu estas ĉio al li en ĉiuj aferoj, pri kiu nenio mortas aŭ pereas, en kiu ĉio vivas, al kiu volonte kaj sentemplime ĉio obeas.

II. Memoru ĉiam pri via celo, kaj pripensu ke la perdita tempo ne revenos.

Se vi ne estas zorgema kaj diligenta, vi neniam akiros virtojn.

Se vi ekvarmetiĝas, vi baldaŭ ekdefalos.

Se vi fervoriĝos, vi trovos grandan pacon, kaj pli facila fariĝos via laboro pro la Dia graco kaj virta amo.

12. Homo fervora kaj diligenta estas preta por ĉio.

Pli granda laboro estas kontraŭbatali malvirtojn kaj pasiojn ol toleri laciĝojn de l' korpo.

Kiu ne evitas malgrandajn kulpojn, tiu falos iom post iom en grandajn (Ekl. XIX, 1).

- Vi ĝojos ĉiam vespere, se vi tagon uzis frukte.

Vin atentu mem, ekscitu kaj avertu vin, kaj kio ajn okazas pri aliuloj, pri vi ĉiam zorgu.

Vi tiom progresados en virto, kiom vi estos vin mem perfortinta.

FINO DE L' UNUA LIBRO



UNUA LIBRO

Utilaj konsiloj pri la vivo spirita

TABELO DE LA ĈAPITROJ

1. — Pri l'imitado de Kristo kaj malŝato de ĉiuj vanajoj mondaj	1
2. — Humile pensu ni pri ni mem	5
3. — Pri la Scienco de Vero....	8
4. — Pri singardemo en agado..	14
5. — Pri la legado de l' Sankta Skribo	16
6. — Pri malordigitaj amemoj..	18
7. — Fierecon kaj vanajn esper- ojn malamam.....	20

8.—Tro grandan intimecon evitu	23
9. — Pri obeo kaj submetiĝo...	25
10. — Senutilajn interparolojn evitu	27
11. — Pri la rimedoj por akiri la pacon internan kaj pri la zorgo antaŭeniri en la virto	29
12. — Pri utileco de malsanco ..	32
13. — Pri kontraŭbatalo al tentoj.	34
14. — Hazardajn juĝojn evitu ...	40
15. — Pri la bonagoj faritaj pro karito	42
16. — Alinlajn difektojn toleru .	44
17. — Pri la religia vivo	47
18. — Pri ekzemplo de l' Sankt- uloj	49
19. — Pri ekzercoj de bona reli- giulo	54
20. — Pri amo al soleco kaj silento.	60
21. — Pri kora sanktmalĝojigiĝo..	67
22. — Konsiderado pri homa mi- zero	72

Tabelo de la Ĉapitroj 103

23. — Meditado pri la morto 78
24. — Pri juĝo kaj puno de l' pek-
uloj 85
25. — Pri fervoro necesa por pli-
bonigi nian vivon 92
Tabelo de la Ĉapitroj 101

